Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Aŭstruja Esperanto-Delegitaro (A. E. D.), Esperanto-Delegitaro de Wien (E. D. W.) kaj Universala Esperantista Pacifista Ligo (U. E. P. L.)

2ª jaro. No. 6 **Monata** **Junio 1925**

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Hovengasse 12, II, 13

Kunlaborantoj! Skribu legeble, retenu kopion, aktualaĵojn sendu ĝis la 1ª de l' monato. Manuskriptoj ne resendataj.

Jarabono: Por Aŭstrianoj aŭ. S 3, Germanoj g. or. M 2, Alilandanoj sv. fr. 3.50.

LA JUNULARPRIZORGADO DE L' URBO WIEN.

Orig.-art. por „A. E." de Walter Smital-Wien.

Inter la teruraj sekvoj de l' granda milito estas unu, kiu plej intense ofendas la koron de homo sansenta: La detruo de multaj familioj rabinta al senkulpa idaro la denaturan vivobazon.

Antaŭ la senekzempla socia katastrofo nur malofte — kompare al nun — okazis, ke pro nevolemo aŭ nekapablo de gepatroj al edukado de siaj idoj ilin devis anstataŭi la socio. Ankaŭ meditigas la fakto, ke eĉ patrinajn korojn ne nur

Tagmanĝo en infanvartejo.

mizero sed ankaŭ sentsurdiga krudiĝo de l' animoj malmoligis tiom, ke patrinoj pli multe parolas nuntempe pri „devoj", kiaokaze ili antaŭe sentintaj estis dolĉan rajton ne parolante pri „rajto".



Iro al manĝado en libertempa hejmo.

l" granda homaro!" kaj danki el profunda kor' al homfratoj oferemaj, kiuj dediĉas sian vivon al nia bedaŭrindega etularo.

En Wien la fama, ankaŭ en „A. E." jam kelkfoje nomita universitata profesoro d-ro Julius Tandler organizis, apogate de l' socialdemokrata partio, ampleksan publikan laboron por savi la junularon el la postmilita ĥaoso. Tiu celado tiom meritas la atenton de ĉiu homamiko, ke kelkaj linioj estu permesataj pri ĝi.

Grandioza „Centra porbonfarta oficejo de la liglanda ĉefurbo Wien" ampleksas Urban Porjunularan Oficejon, departementojn por malriĉulaferoj, por resanigejoj kaj fleginstitutoj, unu por invalidaferoj kaj la urban porsanecan oficejon.

Ĉar en Wien ekzistas nun prksm. 35.000 daŭre prizorgotaj infanoj, estas necesa densa reto da prizorgaj institucioj. La teritorio de l' urbo do estas partigita en 160 prizorgdistriktoj. En ĉiu agadas po unu urba prizorgistino. Ŝi interrilatas kun la lernejoj de sia distrikto kaj devas koni ĉiujn domojn tie kaj ties enloĝantojn. Funkcias 13 urbaj distriktoficejoj porjunularaj, estrataj de supera oficisto juronscianta aŭ transprenita el juĝista rondo, po unu aparta infankuracisto, profesiaj prizorgistoj kaj oficeja personaro. Ĝeneralaj taskoj de ili estas la zorgo pri vivtenado, saneco, edukado, rajtprizorgado; specialaj taskoj: 1. profesia prizorgado, 2. kontrolo pri infanoj edukataj en fremdaj familioj, 3. kontrolo de infanlaborado, 4. lernejanprizorgado.

La bedaŭrinda sekvo de tia ĝisfunda ĝenerala mensoŝanĝiĝo estas, ke la socio, kiun naivaj idealistoj iam povis interpreti „libervola kuniĝo de homoj por plikulturiĝo" ekestis timigfantomo kruela, perfortiganta ĉiam pli la volliberecon de l' unuopulo, ne feliĉigante, helpemigante sed sklavigante lin, kaŭzante tiel abomenan perspektivon al naŭziga estonto, en kiu generacioj da mizeridoj kriados laŭ la ekzemplo de siaj malbenitaj naskintoj: „Mizero, mizero, ho kia mizero estas ĉi vivo!"

Irante kun malfermitaj okuloj tra tia ĉi nia tempo, homo ankoraŭ iom nature sentanta devus preĝi al la forto mistera: „Redonu la ĝojon al la infanaro de

1. Aŭtomate la porjunulara oficejo transprenas la ĝeneral-prizorgistecon je eksteredzecaj infanoj, por kiuj intervenas Wien-a distriktjuĝejo. Nun estas prksm. 12.000 infanoj sub tiu ĝenerala prizorgista gardado.

2. Al la kontrolo estas submetitaj ĉiuj infanoj ne jam 14 jaraj, edukataj en fremdaj familioj. La oficejoj funkcias samtempe kiel ŝtataj kontrolorganoj por en familioj flegataj infanoj. Ĉiu ĉe fremduloj nutrata, flegata aŭ edukata infano estas tie anoncota. — Por 3.000 en institutoj troviĝantaj infanoj ekzistas aparta kontrolejo.

3. Sub kontrolo koncerne laboradon estas ĉiuj infanoj ĝis sia 14a jaro. Ĉiu infanlaboro endanĝeriganta la korpan aŭ spiritan sanecon aŭ la moralon, aŭ kiu malhelpas la plenumon de l' devo al lernejpartopreno, estas malpermesata. Entute ne permesita estas, uzi infanojn por profesiaj laboroj antaŭ atingita 12a vivjaro (por terkulturado kaj propra mastrumado antaŭ la 10a jaro) kaj por publikaj spektakloj, teatra prezentado k. s. enspezigaj aranĝoj.

4. En multaj okazoj necesiĝas publika helpo ankaŭ por lernejanoj, se temas pri mizerstato saneca, ekonomia, eduka aŭ rajta. Pro tio ekzistas institucioj por prizorgado de lernejanoj 6—14-jaraj. Ĉiun duan semajnon la koncernata prizorgistino akompanate de la lerneja kuracisto vizitas ĉiun lernejon. Ĉio necesa ĉiokaze estas notata kaj poste priparolata kun la gepatroj respektive la instruistoj aŭ ĉe la porjunulara oficejo. La prizorgistino do estas praktike interliga persono inter oficejo kaj lernejo unuflanke, inter lernejo kaj gepatroj aliflanke; ŝi pro tio ankaŭ ĉeestas la konferencojn de la gepatroj kaj instruistoj. Ŝi zorgas bezonokaze ankaŭ pri regula lernejpartopreno, pri eksterlerntempa enhejmigo de lernejanoj en vartejoj aŭ infanhejmoj, pri transpreno de infanoj en edukejon, pri manĝigo, notas refreŝiĝon-bezonantajn por somerorestadejo, kaj interkonsente kun la urba oficejo por profesielekto zorgas pri perado de metilernantpostenoj. Karakterizas la mizerstaton precipe de la junularo en lernejdeva aĝo, ke inter ĉiuj daŭre prizorgotaj infanoj en marto 1925 preskaŭ 50% apartenis al tiu aĝkategorio. Kontentigajn sukcesojn de tiu zorgado precipe garantiis la komprenema helpema sindono de la urba instruistaro.

Noktpasigejo por migrantaj gejunuloj.

Kompreneble oni lasas kiom eble la infanojn en siaj familioj. Sed tial ankaŭ necesaj estas institucioj, kiuj kompletigas tiun edukadon, precipe ĉar multaj patrinoj estas ankaŭ devigataj profesie labori eksterdome.

Al tiu bezono servas infanvartejoj kaj taghejmoj. 58 tiaj infanvartejoj funkcias en diversaj distriktoj de la urbego de la 7a ĝis la 17a horo ĉiutage, ke tiel la patrinoj povas al laborejo irante deponi siajn idojn kaj revenante preni ilin kun si. La malgrandaj infanoj tie ne nur estas sub kontrolo kaj edukataj sed ankaŭ korpe flegataj kaj ricevas maten- kaj tagmanĝon. Proksimume 5000 infanoj estas tie.

En la taghejmoj infanoj en lernejdeva aĝo estas simile prizorgataj en la lernejlibera tempo (pli ol 1100).

Al la kostoj de ambaŭ institucioj la gepatroj devas laŭpove kontribui, por restigi ĉe ili la respondecosenton pri siaj idoj.

En precipe gravaj okazoj de edukmizero, se infano estas jam malboniĝinta en teruraj cirkonstancoj, oni enhejmigas ĝin interkonsente kun la gepatroj aŭ eventuale kontraŭ ties volo en edukprizorga instituto. Tiuj antaŭaj „pliboniginstitutoj“ memorintaj malliberejojn nun depost la transpreno flanke de la komunumo estas transformataj laŭ modernaj kuracpedagogiaj konsideroj. Ekzemple la instituto en Eggenburg disponas propran lernejon, grandiozajn lernejajn laborejojn kaj vastan teritorion por agrikulturo. Higieno tie estas la ĉefa kuracilo por la malsaniĝintaj infananimoj (600).

Por la sanrestigo kaj taŭgigo de l' infanaro ĝenerale servas ludplacoj kaj ludherbejoj, infanbanejoj, somerrestadejoj kaj por bezonantoj publikaj infanmanĝigejoj.

Ĉiuj branĉoj de la infanprizorgado en Wien inkluzive la flegado de malriĉulinfanoj, orfejoj, infanvartejoj, instituto en Eggenburg, Karolinen-infanhospitalo en Wien, lernejaj dentklinikoj kaj lernejaj kuracistoj kostis en 1924 multe pli ol 136 miliardojn da kronoj.

LA KONTRAŬVIZITO DE L'MAJSTRO.

Hieraŭ vesperkrepuske mi sidis sola en la ĉambro, meditante pri la letero de mia juna blinda amikino Rosine B...., per kiu ŝi petas min, rakonti ion en „Aŭstria Esperantisto“ pri „Ligilo por Vidantoj“, kiam subite, anĝele dolĉa, nedireble melodia voĉo frapis mian orelon kaj per pia ĝojo ektremigis ĉiun fibron de mia koro. Dum ĉiela lumo plenigis la ĉambron, eksonetis samtempe delikata sfera muziko. Antaŭ mi staris la Majstro. — „Saluton, kara amiko“, li diris kun milda rideto. Mi volis eksalti, sed per facila mangesto li devigis min, resti sidanta, daŭrigante: „Mi venis, por redoni la viziton, kiun vi faris al mi antaŭ kvar jaroj en paradizo. Pardonu la longan prokraston, sed tio ne estis farebla pli frue, sen grava kaŭzo. Nun tia kaŭzo troviĝis. Vi ja scias, ke dum la XVIa en Wien estis fondata ‚U. A. B. E.' t. e. ‚Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj'. Jen gravega organizo de niaj senlumaj geamikoj! Sed por atingi ekzisteblon, ĝi nepre bezonas fortan kaj daŭran subtenon de la vidanta samideanaro. Tiucele ĝi eldonas monatan revueton kun la titolo ‚Ligilo por Vidantoj', kiu estas ne nur informilo kaj varbilo, sed efektive bonega legaĵo kun interesaj artikoloj, ĉarmaj gajigaj rakontoj kaj kortuŝantaj poemoj. — Mi tre deziras, ke la vidantaj Esperantistoj grandnombre aliĝu al ‚U. A. B. E.' kiel membroj subtenantaj.*) Tiel ili helpos ne nur al niaj karaj blindaj gefratoj, sed akcelos perpere eĉ nian tutan movadon. Mi do petas vin, kara amiko, varbu en via gazeto ‚Aŭstria Esperantisto' kaj klopodu persiste, por ke plejeble baldaŭ efektiviĝu ĉi tiu mia kordeziro kaj ....“

„Halo, halo!“ eksonis akre en mian orelon, la ĉiela vizio malaperis kaj mi vekiĝis kun la radioaŭskultilo surkape.

F. Zwach, Wien.

*) Jarkotizo minimume 4 svisaj frankoj, pagota senpere al la trezoristo, s-ro W. Percy Merrick, Penso, Shepperton, Anglujo — aŭ al nacia Esperanto-konsulo por blinduloj (por Aŭstrio: f-ino Stefi Zehetner, Wien, II., Am Tabor 6.)

SALZBURG,

la perlo inter la muzikurboj de Eŭropo;

Sonorilturo.

la urbo de la Va Tutaŭstria Esperanto-Kongreso.

VENU AL SALZBURG!

Ĉu por vigligi la sopiron
al la eterna font' de l' belo
la antaŭuloj la admiron
alkroĉis al Salzburg-kastelo?

Ĉu por ornami la lulilon
de l' geniulo de ario
dismetis ĉian sian brilon
la Dio de la harmonio?

Ĉu falis el ĉiela krono
al ter' ĉe norda alpa raŭdo
juvelo, altvalora ŝtono,
el kiu ĝermis fea lando?

Respondon ja poetoj donas
laŭdantaj ĝin per belaj vortoj,
el kiuj klare al vi sonas
la am' al ĝi per ĉiuj fortoj.

Respondon donas, kiu vidis
la alpan perlon en sunbrilo,
kaj en gajega rondo sidis,
dum jubiladis kanta trilo.

Respondon donu vi sincere
pri Mozart-urbo je la fin'
spertinte ĉion mem senpere!
Do venu kaj ĝuadu ĝin!

F. Christanell.

POR KIO TUTAŬSTRIA ESPERANTO-KONGRESO?

Lerninte Esperanton oni havas naturan deziron ankaŭ uzi sian konon kaj ĉerpi el ĝi utilon. Sed ju pli da aliaj homoj ankaŭ scipovas Esperanton aŭ interesas pri ĝi, des pli facila fariĝos la uzo, kaj des pli granda povos esti la ĉerpebla utilo. Do ĉiu Esperantisto havas naturan intereson je propagando. Precipe estas kunvenoj de esperantistoj laŭ multjara sperto tre taŭgaj por vigligi la propagandon. Oni interkonatiĝas kun samcelanoj, oni konvinkiĝas pri la taŭgeco de la lingvo, povas interkonsiliĝi pri komunaj kaj pli efikaj paŝoj, oni aŭdas pri metodoj kaj sukcesoj en aliaj lokoj, unu fervorigas la alian, kaj precipe oni atentigas la publikon kaj oficialajn personojn pri la graveco de nia movado. Do estas domaĝe, ke jam 12 jarojn ne plu okazis ĝenerala kunveno de aŭstriaj esperantistoj, dum en multaj aliaj landoj de post la milito jam regule ĉiujare okazas naciaj Esperanto-kongresoj. Intertempe en Aŭstrio multaj lernis Esper-



Parko de Mirabell.

anton, kaj kelkaj novaj grupoj estas fonditaj. Multaj ĝis nun ne havis okazon interkonatiĝi kun alilokaj samideanoj. Do, karaj gesamideanoj, venu al la Va Tutaŭstria Esperanto-Kongreso en Salzburg kaj instigu ankaŭ aliajn konatulojn de vi, por ke la kunveno estu bone vizitata, kaj kunhelpu tiel laŭ via forto progresigi nian gravan kulturmovadon. Kelkaj jam anoncis sin, sed ankoraŭ tro malmultaj. Nun ne plu hezitu, ne nur, por ke ni povas dece prepari ĉion, sed precipe, por ke ni povas zorgi, ke vi ricevos taŭgan loĝejon en tempo, kiam pro la venontaj festludoj multaj neesperantistaj fremduloj ankaŭ estos en Salzburg. Do aliĝu kaj aliĝu tuj!

PROGRAMO DE LA Va TUTAŬSTRIA ESPERANTO-KONGRESO

8., 9., 10. Aŭgusto 1925 en Salzburg.

Sabate, 8. je la 20a: En „Wolf-Dietrich“ salut- kaj interkonatiĝ-vespero.
Dimanĉe, 9. je la 9a: En oficiala kunvenejo prepara kunveno de A. E. D.-prezidantaro.
je la 10a: Solena malfermo de la Kongreso.
je la 14a: Preparo de la ĉeflaborkunsido en A. E. D.-kunveno.
je la 16a: Forveturo per tramo al la belega kastelo Hellbrunn.
je la 20a: En „Wolf-Dietrich“ amuza vespero.
Lunde, 10. je la 9a: A. E. D.-kunveno por prepari la tagordon.
je la 10a: Ĉeflaborkunsido; mallongaj referatoj pri propagando, gazetaro, instruo, literaturo, ekzamenoj, organizoj, oficialigo, poste diskuto, proponoj, decidoj.
je la 14a: daŭrigo kaj fino de la oficiala parto. Poste promenado.
je la 20a: Propagandvespero publika kun honorgastoj. Germanlingva raporto pri la Ĉeflaborkunsido. Parolado kvaronhora pri Esperanto kaj laboristaro, dua parolado pri Esperanto en la lernejoj, tria pri la graveco de Esperanto por komerco kaj trafiko. Inter la paroloj alparolos alilandaj gastoj en Esperanto. Fermo.

LKK de la Va.

AĈETONTOJ PREFERU JENAJN REKOMENDINDAJN FIRMOJN ESPERANTEMAJN!

Bona kafo: Kafejo „Glockenspiel“, Mozartplatz.
Ĉokoladoj kaj sukeraĵoj: B. Rajsigl, fabriko, Vierthalerstr. 14—16, vendejo: Dreifaltigkeitsg. 9.
Manĝaĵoj por vojaĝo: Stranz & Scio en la naskiĝdomo de Mozart, Getreidegasse.
Bonaj sudfruktoj: A. Wegner, Residenzplatz.
Belaj memoraĵoj kaj specialaĵoj de Salzburg: Th. Hattinger, Bismarkstr. 12.
Ludiloj kaj ŝercaĵoj: Neumüller, Rathausplatz.
Brosoj, kombiloj ktp: J. Altenaichinger, Linzerg. 6.



Mozart.

Gantoj: Sperl, Rathausplatz.
Turist-bezonaĵoj ĉefe pluvmanteloj: L. Haas, Platzl 2.
Vestaĵoj ĉiuspecaj: S. Schwarz, Ludwig Viktorplatz.
Modernaj- kaj sportvestaĵoj por sinjoroj: Wilh. Slama („Zum Edelweiß") Ludwig Viktorplatz 8.
Bezonaĵoj por turistoj kaj kajakveturantoj: Herm. Amanshauser, Residenzplatz 7.
Metalaĵoj: Grandvendejo K. Steiner, A. G.
Paper-, skrib- kaj desegnad-bezonaĵoj: Hackenbuchner, Getreidegasse.
Apoteko: H. Hinterhuber, Linzergasse 7 (Vicdel. de U. E. A.).

ĜENERAL-DIREKCIO DE LA AŬSTRIAJ LIGLANDAJ FERVOJOJ

eldonis laŭ iniciato de s-ro Hugo Steiner, ĝen. sekr. de A. E. D., la jenan ofican cirkuleron:

Akt-nro. 53532/25.
Koncern.: Esperanto.

Al ĉiuj direkcioj de la
Liglandaj Fervojoj.

Plenumante peton de Aŭstria Esperanto-Delegitaro ni oficordonas al vi, raporti al ni la nombrojn de tiuj al vi submetitaj dungitoj, kiuj

1. scipovas Esperanton,
2. nuntempe lernas tiun ĉi lingvon,
3. volas lerni tiun lingvon en aŭtuno de l' nuna jaro.

Wien, 14. VI. 1925.

La Ĝen.-Direktoro
d-ro Maschat.

STUDHELPAĴOJ POR LA ŜTATAJ EKZAMENOJ PRI ESPERANTO.

En la kunsido de la ŝtata ekzamenkomisiono okazinta la 5. junio sub prezido de ĝia direktoro Hofrat d-ro Wollmann oni decidis rekomendi jenajn verkojn por la ekzamenpreparo en 1925/6 ĝis 1927/8. (La unua ekzameno estos fine de oktobro ĉijare. La redakcio.)

I. Por la kontrolo pri scio de Esp.

Por studado:

1. Iu lernlibro (aŭstriaj: Schamanek, E.-Sprech- u. Übungsb. — Graz, Paulusverlag, Karmeliterplatz 5 — Ŝ 1.— aŭ Glück-Sós, Vollst. Lehrg. — Wien, Paul Knepler, I., Liechtensteg 1 — Ŝ 1.50).
2. Schröder, Kl. prakt. Wörterb. — Wien, Hartleben, I., Singerstr. — Ŝ 1.80.

Por tralegado:

3. Zamenhof, Fundamenta krestomatio — Paris, E. Centra Librejo, 51 rue de Clìchy — Ŝ 4.25.
4. Raimund-Zwach, Malŝparulo — Leipzig, Hirt u. Sohn — Ŝ 3.06.

Krom tio por komerc-laborantoj:

5. Borel, Komerca korespondo, n-ro 16 E.-Biblioteko Intern. — Berlin, Ellersieck & Borel — Ŝ 0.72.

II. Por la ekzameno pri instrukapablo.

Por studado:

1. vidu I. 1.
2. Schröder, Method. Lehrb. m. neuestem Wörterb. — Wien, Hartleben — Ŝ 3.—.
3. Zamenhof, Lingvaj respondoj — Paris (v. I. 3) Ŝ 1.90
4. Brüggemann, Historio de E. kaj paroladoj de Zamenhof — Dresden A 27, Fried. Ader — Ŝ 2.20.

Por zorgema tralegado:

5. vidu I. 3.
6. Privat, Vivo de Zamenhof — Leipzig, Hirt & Sohn — Ŝ 3.40.

Je elekto por plua legado:

7. Shakespeare — Zamenhof, Hamleto — Paris (v. I. 3) — Ŝ 2.40.
8. Goethe-Wüster, Hermano kaj Doroteo — Int. Mondliteraturo, Leipzig — Hirt & Sohn — Ŝ 2.21.
9. vidu I. 4.
10. Orzeszko-Kabe, Bona sinjorino — n-ro 3 der E. Bibl. Int. Berlin (v. I. 5) — Ŝ 0.72.
11. Zamenhof, El la biblio — n-ro 6 (v. II. 10) — Ŝ 0.72.
12. Zamenhof, El Dramoj — n-ro 7 (v. II. 10) [Fragmentoj el „Ifigenio en Taŭrido" de Goethe kaj „La Rabistoj" de Schiller] — Ŝ 0.72.

Ankaŭ legado de gazeto estas rekomendata.

Estu nomataj: Aŭstria Esperantisto, Korneuburg, Howeng. 12, jarabono Ŝ 3.—, Esperanto — Genève, Heroldo de Esperanto — Horrem b. Köln.

En la petskriko pri allaso al ekzameno oni citu, kiujn verkojn onilegis.

Por preparo pri ĝenerala pedagogio kaj metodologio de la prilingva instruo:

Iu lernolibro pri edukado kaj instruado ĉe aŭstria faklernejo instruista enkondukita ekz.:

Ant. Herget, Erziehungslehre, Ŝ 2·86; ders., Unterrichtslehre. S 2·45. Wien, Verlag Haase, III., Rennweg.

K. Boeddeker, Der Aufbau des neusprachlichen Unterrichtes auf seiner natürlichen Grundlage. Ŝ 1·80 Leipzig, G. Freytag.

O. Thiergen, Methodik des neuphilologischen Unterrichtes. Ŝ 7·20. Leipzig, Karl Teubner.

Instruistoj bezonas nur plenumi la ekzamenon pri metodoj prilingvaj kaj tial nur devas studi la lastnomitajn du librojn.

Supre cititaj libroj estas mendeblaj ĉe

Libera Esp. Laborkomuno

Wien, VII., Lerchenfelderstraße 23
(Kafejo Eckher).

AKADEMIO DE L' SCIENCOJ EN WIEN.

La fame konata profesoro Wilhelm Exner estis elektata honora membro de la „Tuta akademio".

En la okazinta jarkunveno estis decidata plivastigo de la laborkampo per akcepto de „tehniko" kaj „politika ekonomio".

La „Lieben"-premion por fiziko ricevis s-ino prof. d-ro Liese Meitner de la universitato en Berlin, naskita en Wien, pro siaj laboroj pri radioaktivaj substancoj.

La „Haitinger"-premio por ĥemio estis dividata inter prof. d-ro Rob. Krehmann en Graz kaj prof. Moser en Wien.

UNIVERSITATKURSOJ DE EKSTERLANDAJ PROFESOROJ EN GRAZ.

En Graz komencis la 3. junio la dua universitat-semajno eksterlandana por Aŭstrio. Parolis pri aktualaj problemoj de nuntempo kaj de germana politiko la jenaj universitataj profesoroj: Götz (Leipzig), Holtzsch, Kraus (Berlin), Konen, Schulte (Bonn), Moldenhauer (Köln), Sauerbruch (München) kaj Schreiber (Münster).

ĜENTILECO — LERNEJA FAKO.

Vojaĝanto en fremda urbo ĉiam havas konsilanton en siaj penoj kaj zorgoj. Tiu ĉi savanto sidas en sia ĉambreto ĉe enirejo de l'hotelo, scipovas paroli kun ĉiu demandanto en ties lingvo, scias por ĉiu konsilon kaj helpon, resume li estas en sia speco ĉionpova kaj ĉionscia, kvankam li nur havas la modestan titolon „hotelpordisto". Ne la titolo esprimas la valoron de homo kaj la pordisto pri multaj aferoj estas pli bone instruita ol liaj noblaj gegastoj.

La metia perfektiga lernejo de la Metiunuiĝo de hotelestroj kaj pensionoposedantoj zorgas por tio, ke ĝiaj lernantoj fariĝu taŭgaj hoteldungitoj. Ili devas posedi ĉiujn virtojn, kiuj kelkfoje ne estas troveblaj ĉe la homoj, kiujn ili servas. Hoteldungito havas la okazon, trovi en sia profesio la agadkampon taŭgan por li.

Necese por ĉiu kompreneble estas la lernado de lingvoj.

Multaj fremduloj vizitas landon, kies lingvon ili ne komprenas. Sed la hoteldungito devas scipovi iliajn lingvojn. En nia hotelistlernejo tial oni instruas francan kaj anglan lingvojn kaj — la necesaj paŝoj jam estas ekfaritaj — espereble en aŭtuno de l' nuna jaro Esperanton. La lernejo festis antaŭ nelonge sian 35 jaran ekziston kaj je tiu okazo la abiturientoj de la tria klaso aranĝis festenan kaj matenmanĝan tablojn por amerikaj kaj anglaj gastoj.

Homo kutimigita nur sidigi sin al bone aranĝita tablo ne scietas, kiom da penadoj kaj sento pri arto estas necesaj prezenti belan kadron por manĝo.

La buŝtuko servas kiel mezurilo por la aranĝado de la teleroj. En tiu agado la kelneraro atingis altan lertecgradon. Ankaŭ ekzistas specialistoj en faldado de buŝtukoj, el kiuj ili scias formi ofte fantazikreitaĵojn.

Por bonega aranĝo de la festena tablo la nove eknomitaj „helpantoj" (rango) bezonis nur dek minutojn.

La instruistaro ĉiam insiste rekomendas al tieaj lernantoj: „Estu ĝentilaj, afablaj kaj servemaj, tio estas la unua devo en via metio“ — ecoj, kiuj ankaŭ estas urĝe rekomendindaj al la ceteraj homoj sen diferenco, kiun metion ili praktikas. H. Steiner.

20% apartenas al vi!

Ĉiuj societoj kaj unuopuloj sentu la moralan devon, akiri al „A. E.“ minimume po unu anoncon por ebligi ekzistadon kaj laŭeble pliampleksigon.

Unu paĝo kostas 35 Ŝ., duono 18 Ŝ., kvarono 9·5 Ŝ., okono 5 Ŝ., anonceto pro ŝanĝo po linio 0·4 Ŝ.; por trifoja aperigo malpliiĝas la kostoj je 5%.

La anoncoj estos tradukataj de ni senkoste. La monon sendu kun mendo kaj teksto al ni.

Va S. A. T.-KONGRESO EN WIEN.

De 11a ĝis 15a aŭgusto okazos la Va S. A. T.-Kongreso en la laborista hejmo Wien XVI, Kreitnergasse. Ĝis mezo de majo aliĝis 90 personoj el 11 landoj. Interesuloj dezirantaj aliĝi aŭ informi sin, skribu al s-ano Josef Slezak, Wien, XX., Ospelg. 34/25. Kongreskotizo por Aŭstrianoj estas Ŝ 2·—.

R. Čech.

Kiu ĝis nun ne abonis „A. E.“ ricevos senpage provkajeron laŭ postulo per poŝtkarto al nia adreso.

Abonantoj!

instigu viajn samlokanojn.

SCENOJ EL LA VIVO DE MIA INFANO.

Orig. por „A. E.“ de Christine Siedl-Wien.

Laŭ nia peto la konata delikatanima s-anino verkis la sekvantajn liniojn, kiuj — kvazaŭ folietoj el taglibro — respegulas idealan komprenkapablon de patrino por la animvivo de sia infano.

I.

Panjo donacas al la dujara Heriberto okaze de lia naskiĝfesto lokomotivon. Ŝi opinias ege ĝojigi lin per tiu ludilo, ĉar li tage kaj nokte fantazias pri fervojaj aferoj. Unuamomente la knabeto efektive estas tute ravita, sed baldaŭ li flanken ŝovas la donacitajon kun la vortoj: „Tio ne estas lokomotivo; ĝi ja ne fumas kaj ne fajfas.“ Poste li alportas longforman skatolon, metas sur ĝin du bobenojn, alŝovas kelkajn aliajn skatoletojn kaj ekkrias: „Panjo, rigardu la rapidvagonaron! Jam eliras fumo kaj vaporo el la lokomotivo kaj nun ĝi fajfas uuu—uu—u!“ (Bonege li trafas la melodion.) Panjo iomete afliktite rigardas al la flanken ŝovita lokomotivo, kiu „ne fumas kaj ne fajfas“. „Kial do . . .“ —, ŝi ekparolas; sed la triumfa ĝojo en la okuloj de la infano haltigas ŝian diron; ridante ŝi daŭrigas: „Pardonu, karulo! Panjo fakte ne konsideris viajn kapablojn. Sed estu certa: Neniam plu ŝi altrudos fuŝimitaĵojn al vi, eminenta kreemulo.“

Nepre certigu al vi la alsendon

de „A. E.“ por la lastaj monatoj de 1925.

Kiu abonis en **aŭgusto 1924** pagis tiam ĝis aŭgusto 1925. Ni petas **tujan alsendon** de la kompletiga sumo: de Aŭstrianoj aŭ. Ŝ 1·30 (per almetita poŝtpagilo), de Germanlandanoj g. or.-M. 1·—, de alilandanoj svis. F. 1·50 aŭ egalvaloro.

II.

„La suno, la suno!“ ekkrias Herĉjo montrante per la maneto al la tria etaĝo de la kontraŭa domo. Tie efektive vidiĝas en fenestro la brileganta disko de l' matensuno fajrerojn ĵetanta en nian ĉambron, en la okulojn de ĝojeganta infano. Rigardante la belan bildon ekdeziras la patrino: „Ho, ke vi ĉiam konservu la povon, esti feliĉa pro la rebrilo de sunradio trafinta la fenestron de via kontraŭulo.“

ENCIKLIKA-FESTO.

Depost la revolucio en 1918 la unua de majo estas en Aŭstrio ŝtata festotago kun absolute deviga laborripozo. Antaŭe nur la socialistoj festis en Aŭstrio tiun ĉi tagon, depost 1918 same agas ĉi tie ankaŭ la organizita kristana laboristaro.

Ili manifestacias por la encikliko de l'papo Leo XIII., nomita „La encikliko laborista“.

Ĉijare la unuan fojon la Esperantista laboristaro kristana de Aŭstrio“ (Wien 65 Fach 21) festis la unuan de majo — kun jena programo: Je la 10a predikis la prezidanto de „Aŭstria Katolika Ligo Esperantista“, pastro prioro Wolfg. Nedwid O. S. B. pri „La katolika eklezio kaj la laboristaro“. Poste legis religia profesoro Lang sanktan meson, dum kiu la gesamideanoj kantis „Al kiu mi min turnu“ de Schubert. La papa himno finigis la eklezian parton de la festo. La muzikan parton prizorgis horestro Josef Grumptmann. Sekvis parolado de l'unuiĝestro pri la enhavo de la encikliko kaj ties valoro kaj utilo por la ŝtatoj, eklezio kaj la socia vivo.

Granda estis la nombro de la partoprenantoj kaj la festo bonege sukcesis.

S-ino Julia Isbrücker-Hago petis de ni la publikigon de jena, Rezolucio, akceptita je la 20a de Aprilo 1925 en la kunveno de Religiaj Gvidantoj dum la Kongreso por Militrituzo en Utrecht (Nederlando). La grupo de Religiaj Gvidantoj kontraŭ Milito kaj Militpreparo, juĝante, ke nur la Kristanaj Principoj povos savi la homojn kaj popolojn, ke tiuj principoj ne sole estas kontraŭataj de la influo de l'peko, sed ankaŭ de pekaj kutimoj, inter kiuj la milito estas la plej detruiga, ke ne nur la milito mokas ĉiun justecon, sed ankaŭ ke la moderna militado ofendas la religie-moralan konscion en netolerebla maniero, ke valoras ĉiun oferon, serioziĝi antaŭ tiu krimo, ke estas pli bone suferi maljustecon ol fari maljustaĵojn, ekbatalos kontraŭ milito kaj militpreparo kaj instigas ĉiujn Kristanojn en kaj ekster la Eklezio, kunlabori por ke la nomoj de Jesuo Kristo kaj Lia ĉiela Patro ne plu tiel abomene estu ofendataj kiel okazis dum la pasintaj jaroj.

Sekretario de la Grupo
Pastro *J. E. Th. Hugenholtz*-Ammeostol.

La ŝakkonkurado inter kvar urboj. La urboj Berlin, Budapest, Prag kaj Wien pentekoste konkuradis en ŝakludo. Venkis la Wienanoj, la duan lokon atingis Prag, la trian Budapest kaj la kvaran Berlin.

Novaj gazetoj:

„La Esperantisto“ eldonis flugfolion „La suna homo kiel celo de savanta edukado“. 50 ekz. kostas por Aŭstrio 1 Ŝ, mendeblaj Wien II., Postamt 34

„La nova tago“, int. Baha'i-Esp. gazeto, Wandsbek (Hamburg), Öhlmühlenweg 66. La unua n-ro estos sendata senpage al ĉiu mendinto ĉe supra adreso.

Reklamo, internacia, esperanta, komerca reklamĵurnalo, prezo po jaro 1 svis. fr. Georgiev, str. Skobeleva 38, Rusĉuk (Bulgario).

Libero, monata revuo internacia de movadoj por la reformigo de la vivo. str. Vitoŝka 48, Sofia, Bulgario.

Reprezentadon de firmoj por Aŭstrio

deziras akcepti tre diligenta, vigla, en multaj rondoj bonkonata sinjoro. Skribu al nia redakcio sub „Reprezentado 25“.

Interŝanĝo de poŝtmarkoj en letero afrankota per aerpoŝtmarkoj kaj alsendota per aerpoŝto.

Mi samvoje respondos tuj. H. Steiner, redaktoro de „A. E.“, Korneuburg, Aŭstrio.

RADIO
BICIKLOJ KAJ
KUDROMAŜINOJ
PICK-WIEN
Centra magaz.: IX, Liechtensteinstr. 27.
Filioj: IV, Wiedner Hauptstraße 10 kaj
VI, Gumpendorferstraße 67.
Oni parolas Esperante!

Aŭstruja Esperanto-Delegitaro

Bisamberg bei Wien Nr. 248.

ATENTU!

Por efikigi la enketon de „Gen.-Dion. der öst. Bundesbahnen“ (vidu pĝ. 63) estas necese, ke en ĉiuj lokoj kaj loketoj, kie ekzistas fervojistoj, la esp-istoj instigu ilin, anonci sin ĉe ilia servestro por lernado de E. en aŭtuno.

Se tiu propagando bone funkcias, multaj kursoj estos aranĝataj por tiu grava rondo. Kie nur malmultaj aŭ izolaj fervojistoj loĝas, simplaj malmultekostaj lerniloj povos anstataŭi kurson.

La nomoj de varbitoj kun adreso estu sciigataj al mi por kontroleblo kaj eventuala subteno.

Steiner, ĝen. sekr.

Por **Salzburg** ĉiuj grupoj kaj izoluloj partoprenontaj anoncu sin **tuj** al s-ro Grössinger, dentkuracisto, Salzburg.

Steiner, ĝen. sekr.

La grupoj kaj izoluloj en Nieder-Oesterreich helpu la organizan laboron de la nova landestraro per tuja alsendo de jenaj datoj: „Nomo de la grupo kaj de ĉiuj anoj kun noto de profesio, ejo (de grupo) aŭ adreso (de izoluloj)“ al la landestro por N.-Oe. s-ano Ant. Goldmann, St. Pölten, Rennbahnstr. 31.

La ĝen. sekr. de AED.

E.-servo en Klosterneuburg, Martinstr. 59. informas ĉiutage de la 9—18a. Kursoj okazis en Klosterneuburg (s-ro Schauer), Weidling (vickolonelo Neumann). En Wördern oni fondis E rondon (s-ro Novotny). En Kierling la movado ekkomencis dcnove.

RAPORTIS PRI ESPERANTO:

„**Radio-Wien Welle 530**“, oficiala revuo de „Österr. Radio-Verkehrs A. G.“ en n-ro 34 la unuan fojon. („La unua internacia Radio-helplibro“. W. Smital, Wien.)

„**Radio-Amateur.**“

„**Radio-Welt**“ ĉiunumere en aparta rubriko, redaktata de d-ro E. Pfeffer.

Ĉiuj Radio-gazetoj publikigis la lecionojn de la Radio-Esp.-Kurso.

„**Allgemeine Elternzeitung**“ en n-ro 5 malfermis apartan rubrikon „Al la mond-helplingva movado“, redakt. de d-ro Pfeffer. („La nuna stato de la E-movado“ — Glück, Berlin.)

„**Der Städtische Angestellte**“ de post oktobro 1924 publikigas en ĉiu n-ro en aparta rubriko gravajn aferojn pri nia movado.

Bohema laborista gazeto „Dělnicky listy“ en Wien publikigas ĉiujn mardon kaj ĵaŭdon (la tagoj de E-kurso en Radio-Wien) Esp.-kurson

Ĝi jam delonge helpas nian movadon per ĉiumarda E.-angulo, redaktata de prof. d-ro Jan Heyer.

*

Por vigligi la por nia afero gravan raportadon de lokaj gazetoj pri E.-o ni komunikas la E.-tradukon de leterteksto direktita al la redaktoroj en Wien kaj petas la samideanojn ekster Wien, agi same en siaj lokoj.

„Al la redaktoro de ....

Konsiderante la konstante plioftiĝantan raportadon pri E. en la Aŭstria gazetaro ni decidiĝis instali indikan rubrikon pri ĝi.

Por ke la nomo de via ŝatinda gazeto ne manku en tiu ĉi listo, bonvolu konforme al via propra intereso regule sendi al ni eltranĉaĵojn kun E.-koncernantaj tekstoj.“

Esperanto-Delegitaro de Wien

Wien, XXI, Am Spitz 14.

La 6. junio okazis la lasta kunsido antaŭ libertempo. La unuan sabaton en septembro (5. IX.) kiel kutime komencos la nova laborsezono.

Smital
prez. de E. D. W.

La E.-sekcio de la turista unuiĝo „La naturamikoj“, pri kiu ni aludis en n-ro 5a, elektis jenan komitaton: prez. Čech, vicprez. Bubetz, sekr. Klein, kas. Ultmann, vickas. f-ino Böhm, gvidantestro Müller. Turnu vin ri informoj al s-ano Alf. Klein, II., Pazmapteng. 10/21. La sekcio aranĝis ĝis nun 4 ekskursojn. En la sekvontaj semajnoj okazos jenaj:

21. VI. al Purkersdorf—Laab am Walde—Mauer; Renkontejo je la 9a ĉe okcident-fervoj-stacio (o. f. st.), gvid. A. Pick.
28. VI. al Pressbanm — Steinplattl — Rekawinkel. Renk: o. f. st., gvid. Bubetz.
5. VII. lunbrilekskurso al Peilstein. Gvid. s-ino Müller
12. VII. al Mauer—Rodaun-Parapluiberg—Höllenstein—Giesshübl—Brunn a. Geb. Kunv. 8'30 en Mauer. gvid. A. Pick.
19. VII. al Tiergarten—Hütteldorf. Kunv. je la 8a.

V. b. b.

Mi bezonas monon!

Tial estas vendataj **je reduktitaj prezoj** la sekvantaj verkoj:

Argus, Pro kio?	S 2·40	Hebbel, Gyges kaj lia ringo	S 3·40
Blicher, Taglibro de vilaĝpedelo	„ —·50	Heine, Elektitaj poemoj	„ —·84
Bölsche, La ama vivo en la naturo	„ —·72	Heyse, Edziĝa festo en Capri	„ —·72
Chamisso, Petro Schlemihl	„ 1·50	Kamm, Eĉ en doloro ni estu ĝojaj	„ —·72
Combe, Dankon	„ —·24	Lessing, Natan la saĝulo	„ 2·40
Dietterle, La vendreda klubo	„ 2·30	Minor, Deutsche Redensarten in Esperanto	„ —·84
En Svislando	„ 2·70	Petöfi, Johano la brava	„ 1·—
Fouqué, Ondino	„ 1·60	Raabe, La nigra galero	„ 1·50
Fricke, Universala legolibro	„ 1·68	Seidel, Vintro-fabeloj	„ 1·50
Goethe, Hermano kaj Doroteo	„ 1·50	Trainer, Nia ĉiutaga pano	„ —·60
Grillparzer, La monaĥejo ĉe Sendomir	„ —·72	Velten, Die Formwörter	„ —·84
Gruner, Kredo kaj scio	„ —·30	Vojoj por vojaĝoj en Aŭstrio	„ —·80
Hauff, La kantistino	„ —·96	Wiseman, Fabiola	„ 6·—

Livero okazos ĝenerale nur post antaŭa pago aŭ je »Nachnahme«.

Emil Schade, Wien, VI.,

Mollardgasse 55/7. Geschäftszeit: 9–15 Uhr.

Kosmetikaj kristalproduktoj!

EUODONT-OM

„Euodont"-kristaldentpasto
„Euodont"-kristaldentpulvoro
„Om"-Parfum Cristallisé
„Om"-florgliceringelato
„Om"-Antimoskito (kontraŭ insektpikoj)

Oni korespondas per Esperanto.

Adreso: Wien I, Helferstorferstr. 4, Schottenhof, IX. Stiege, Tür 2.

Eldonanto: Esperanto-Unuiĝo en Korneuburg (Redaktoro: Hugo Steiner, Korneuburg, Hovengasse 12). — Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.